

ŜIN MI AMAS

Esperantigo : Rovere Emanuele

uziko : Mccartney Paul / Lennon John

Al mia korvirin' ĉion mi donus
kaj, se vi konus ŝin, ankaŭ vi ŝin amus : ŝin mi amas.

Nur ŝin regalas mi per tenereco
kaj kisojn donas ŝi, kun ama eco : ŝin mi amas.

Jes, mia amo daŭros poreterne nur kondiĉe, ke restu ŝi kun mi.

La steloj el ĉiel' certigas min,
ke, ĉiam kun fidel', ŝi amos min sen lim' : ŝin mi amas.

Jes mia amo vivos poreterne, nur sufiĉos, ke restu ŝi kun mi.

La steloj el ĉiel certigas min,
ke, ĉiam kun fidel, ŝi amos min sen lim' : ŝin mi amas.